

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50.

33, rue Lacépède — PARIS — rue Lacépède, 33

LA MALGRANDA VENTUMILO

Fumante cigaredon, sinjoro Valter, juna kaj inteligenta oficiro de artilerio, revis pri multe da aferoj, kiam lia amiko kaj kolego sinjoro Margin frapis la pordon de la ĉambro. Sinjoro Valter, kiu rekonis la alvenon de sia amiko, ekkriis ĝoje : « Eniru ».

Sinjoro Margin, alnomita « la bela Margin », tute meritigis sian alnomon : li estis granda, havis fortajn muskolojn, kaj, per siaj afablaj manieroj, li estis tre agrabla. Li sciis bone tion, kaj li sin rigardadis volonte en la speguloj. Kiam li estis preminta la manon de sia amiko, lia unua zorgo estis iri rapide apud la kamenon por sin rigardi en la spegulo kaj por kontroli, ĉu li estis ĉiam en ordo. Efektive, ĉio estis perfekta.

Tre kontenta pri tiu rapida kontrolo, sinjoro Margin sin turnis subite, kaj, neatenta, li ŝovis malgrandan ruĝan skatoleton, kiu falis teren. Ĝi malfermiĝis kaj el ĝi eliĝis malgranda ventumilo el malnova silko, sur kiu estis pentritaj kelkaj bluaj floroj ; el ĉiu branĉo de la ventumilo eliris po unu malgranda blanka plumo, kio estis « rokoko »-stila, tute ridinda.

— Ha ! ha ! — ekkriis sinjoro Margin, — mi surprizas vin, konservantan pie ventumilon de junulino !

— Ĝi ne estas ventumilo de junulino, — respondis sinjoro Valter per tono malkontenta. — Kiu estas, inter la junulinoj, kiujn ni renkontas en kunvenoj, la knabino havanta manon sufiĉe malgrandan por uzi tiun ĉi objekteton ?

— Verdire, ĝi ne estas granda ; ŝajnas, ke ĝi apartenas al feino Aŭ eble ĝi estas afero de « kotiliono », kiu memorigas al vi triumfon de monda dancisto.

— Ne, vi eraras ankoraŭ.

— Fine, ĉu vi parolos? Kial tiom da mistero? Kio ĝi estas? Mi petas, diru ĝentile al mi.

— Ventumilo de pupo.

— Ventumilo de pupo! — ekkriis sinjoro Margin, levante la brakojn al la ĉielo. — Vi frenezigās, mia malfe-liĉa amiko.

— Ne, kaj mi ne donus tiun ventumilon por ĉiuj oroj de la tuta mondo. Ĝi estas la ventumilo de tiu pupo, kiu apartenis al mia patrino. Kiam mi estis infano, tiu ĉi stranga objekto plaĉis ĉiam al mi; mi petis ĝin ofte de mia patrino, kiu konservis ĝin en skatolo plenigita je memoraĵoj, sed ŝi rezervis ĝin por min rekompenci, kiam mi farus grandegan bonfaron... Iam, kontraŭ mia kutimo, mi obeis rapide al mia patrino, kiu, tute kontenta kaj mirigita pri tio, donis al mi la beletan malgrandan ventumilon. Por mi, ĝi ŝajnis la feliĉo mem; kiel mi estis kontenta pro tiu donaco! Dum multe da horoj, mi fermis kaj malfermis la malgrandan ventumilon; nur mia kontenteco egalvaloris mian senton de admiro. En la nokto, mi ekdormis tenante mian karan trezoron en mia mano.

« Kiam mia patrino estis infano, ŝi ĉirkaŭis sian pupon per atentaj zorgoj, ŝi deziris, ke ĝi havu grandegan komforton, pro tio, ŝi aĉetis, per siaj ŝparoj, tiun ventumilon. La infanaj zorgoj, kiujn ŝi malŝparis al sia artefarita bubo, estis la antaŭsigno de la tuta amo, de la tuta sindonemo, kiujn ŝi rezervis por mia malsana infaneco.

« Mi estas ankoraŭ en la mondo, nur ĉar mia patrino maldormis dum multe da noktoj apud mia lulilo, ĉar, en la tagoj, mia patrino metis min sur siajn genuojn kaj premis min ameme al sia koro. »

Kiam sinjoro Valter finis sian rakonteton, li estis tute mirigita pro la kortuŝita sintenado de sia kamarado pri plezuroj; li ankaŭ, kiel sinjoro Valter, pripensis al sia kara patrino, mortinta antaŭ longa tempo.

La du junaj viroj, kliniĝintaj super la malgrandan ventumilon (kiu ŝajnis infaninda pro siaj blankaj plumoj), estis kunigitaj en tiu penso, la plej nobla el la homa koro, la amo de la infanaj memoraĵoj kaj de la familia domo.

M. VALLIENNE.



TRI POEZIETOJ

Al F-ino Lily Green.

*Plej alta devo de poeto —
Per kantoj veki en anim'
Liberan senton kaj profete
Nin voki per potenca rim'
Al estonteco plej felica,
Konstrui kiun devas ni...
Lin rekompenc' atendas riĉa :
De mond' benata estos li...*

Al F-ino K. G. Razumnikova.

*Frosta nokto. Neĝo falas.
Per nebul' kovrigis val'.
Kun mallumo lum' batalas, —
Kiu venkos en batal'?*

*Malrapide laŭ silenta
Kampa vojo iras mi.
Elrigardis lun' argenta,
Eklumigis ĉion ĝi.*

*Vento fajfas. Falas neĝo.
Kaŝis lun' per nubo sin.
Krakas ie Frosto-Reĝo.
Iras mi... sen cel'... sen fin'....*

Al « Juna Esperantisto ».

*Ideo flama min ĉiam vokas
Antaŭen iri, kun sort' batali.
Mi ĝin obeas, danĝerojn mokas,
Kaj en batalo ne timas fali.*

*Mi iras ĉiam, ne ripozante,
Transiras ĉiam de lok' al loko.
Mi iras rekte, ne perfidante
Al min gvidanta interna voko.*

*Ĝi min kondukas al granda celo,
Al celo nia sub verda stelo,
Al celo bela, al celo alta.*

*Al ĝi dediĉis mi mian kanton,
Kaj koron mian, de am' flamantan.
Al ĝi mi iras sen lac', sen halto.*

GEORGO DEŜKIN.

KIAM ESTAS MERKREDO, KIAM JAŬDO

(Rakonto, en kiu troviĝas ankaŭ vero.)

Sidiĝinte sub la ombro en la urba ĝardeno, mi strekadis per mia bastono figuretojn en la sablon kaj serĉadis en mia varmiĝinta kapo la motivojn, kial mi estas forpelita el mia ofico.

Ricevinte la leteron, per kiu oni min sciigis pri la suprediritaĵo, mi tuj iris al la ministro, sed li ne bonvolis akcepti min. Mi postulis klarigon de la oficestro; sed plian respondon, ol tiujn ĉi du longajn kaj du mallongajn vortojn: « en intereso de l'servado » — mi ne ricevis de li.

— Nu, kion mi povis fari, sinjoro. Mi ja estas ordama, laborema . . .

La estro de l' ministra fako, kvankam sciis, ke mi ne kredas, ke li estas tiagrada malsaĝulo, levis siajn ŝultrojn, palpebrumis trans la okulvitroj kaj kondolence ridetis al mi. Lia ironia rideto komprenigis al mi, ke mi estas erariginta sur la vojo kaj mi ekrapidis . . . al la ĝardeno, kompreneble.

Tiel. Mi do strekis figuretojn en la sablon kaj meditis :

— Kia malrajto, kia partieco ! Oni forpelas min, kiu posedas klerecon, praktikon, sciojn kaj bonan konduton ; kaj Kupikov, Prazdnikov, Kiskinov — unuagradaj mallaboremuloj ! — ilin oni ne tuŝas. Sed . . .

Tie ĉi mia pensado estis ĉesigita, ĉar iu tuŝetis mian ŝultron.

— Stavro, al vi, ĉu oni . . . ? — ridetis unu el miaj samurbanoj, oficisto en la statistikejo, kaj blovis sur sian manplaton.

— Jes, oni forpelis min.

Mi volis lin renkonti trankvile, sed li komprenis mian maltrankvilecon, kaj antaŭ ol mi ekparolis, li sidiĝis apud min sur la benkon kaj komencis :

— Aŭskultu min, por diri al vi unu rakonton : « Unu ĝibulo iris ĉe iun hodĵa'n (turka pastro), por kuraciĝi de li.

— Vin nur la diabloj povas elkuraci, — diris al li la hodĵa. — Iru en la konatan muelejon kaj tie atendu ilin. Kiam ili estos kunvenintaj, vi faros tion, kion ili faras. Kaj vi estos elkuracata.

La ĝibulo iris en la muelejon. Noktomeze kunvenis la diabloj fronte kun la ĉefdiablo. Kiam ili demandis lin, kial li venis, tuj post lia respondo ili komencis dancadi kaj kanti :

— Merkredo estas, hodiaŭ estas merkredo, merkredo estas . . .

La ĝibulo stariĝis inter ilin kaj ankaŭ li komencis dancadi kaj kanti.

Kiam ekvidis lin la ĉefdiablo, li batetis lin sur la dorso, diris ion diable, kaj ordonis al siaj subuloj, ke ili demetu de lia dorso la ĝibon kaj ĝin alkroĉu sur la muron. Tiel okazis ; kaj la homo kun rektigita dorso reiris hejmen.

La sekvintan tagon, alia ĝibulo, sciiginta pri la okaz-

intaĵoj, ankaŭ iris en la muelejon, por rektigi sin de la diabloj. Ree noktomezo; ili kunvenis kaj kantis sian ŝatatan kanton:

— Merkredo estas, hodiaŭ estas merkredo, merkredo estas....

Ripetinte tion ĉi kelkfoje, la ĝibulo turnis sin al ili kaj ĝentile rimarkigis:

— He! kiel estus eble, ke hodiaŭ estas merkredo? Hodiaŭ ja estas ĵaŭdo.

— Ha! ĉu tiel? Lia moŝto volas scii pli ol ni, — diris la ĉefdiablo. — Dekroĉu de la muro la alian ĝibon kaj metu ankaŭ ĝin sur lian dorson.

Kaj oni lin resendis hejmen, anstataŭ kun unu — kun du ĝiboj. » Ĉu vi komprenas nun? — ridetante demandis mia kunparolanto.


— Tio estas, — ekscitite mi respondis, — ke mi ne sciu, kiam estas merkredo kaj kiam ĵaŭdo.

— Ho ne, ne tion, kokideto mia! Vi povas scii, kiam estas merkredo kaj kiam ĵaŭdo, sed tion ĉi vi ne devas diri al diabloj.

... Mia amiko ekiris hejmen, kaj mi, rigardante post li, maŝinece murmuretis:

— Merkredo estas, hodiaŭ estas merkredo, ne estas ĵaŭdo.....

El la bulgara lingvo tradukis GAVRAIL POPOV.



BRAHMANO KAJ PAPILIO

De W. RENARD.

Nokto etendis ombrojn per malĝoja krepusko ĉirkaŭante la tutan mondon.

En tiu nokto nigra, senluna kaj senstela, en tropika nokto sufoka, el kokono pendanta en tea floraro, eliĝis grandega, centkolora papilio.

Maldiligente elŝoviĝis la novnaskiĝinto el sia ĝisnuna malliberejo, rektigis siajn ĉifitajn, radikolorajn flugmembranetojn, instinkte elserĉis per siaj palpiloj floron, satigis per ĝia mielenhavo — kaj forflugis en la krepuskan mallumon, en ĝis nun al li nekonata spaco.

Suprenflugis li tre alten, blinde liberflugante en senlima spaco, — subite li de supre ekvidis lumradion — refleksaĵon de malproksime flagranta fajreto.

Kun gaja zumo de l' feliĉo ekflugis li rekten tra la lumanta radia vojo kaj enfalis en malriĉan argilan kabaneton de brahmano, kiu recitis fervore preĝojn ĉe lumo de oliva lampeto.

La sankta viro per subita movo de l' mano kaptis la neinvititan gaston kaj zorge ŝirmis lin per delikate plektita korbo el trunketo de laga scirpo.

Ekbatis per siajflugiloj la malgranda malliberigito, tiel subite senigita de libereco, indignante en papilia zumo :

— Malvirta monstro ! . . . li preskaŭ sufokis min ! . . . ne permesis proksimiĝi al tiu bela fajreto kaj min fermis en tiun ĉi malvastan, maloportunan kaĝon. Mi malbenas cin, aĉa monstro !

La brahmano, konanta ankaŭ sekretajn sciencojn, komprenis la radikolorulon, ekridetis kaj — liberigis la papilion el la korbo.

La malsperta papilio, volontege kaj subite jetis sin al la lampeto, kaj post minuto li falis kun forbrulintajflugiloj, mortante en doloro kaj turmento.

.....


Pasis la nokto. Hele mateniĝis. La suno superŝutis per amaso da dispolvita oro, per printempa ĉarmo la ridetantan teron, ĵetante radiajn brilojn eĉ en la mizeran dometon de l'brahmano.

La mortanta papilio per estingiganta vido ekrigardis la fajran sundiskon kaj lastaspire ekzumis :

— Malbenita monstro ! kial permesis li al mi pereji en mizera fajreto, sciante, ke baldaŭ sekvos tiel ĉarma lumo ? . . . Malbeno al ci, sentaŭga monstro ! . . .

La brahmano maldolĉe ekridetis, iom enpenisiĝis kaj daŭrigis fervore paroleti la vortojn de l'preĝo.

El la pola lingvo tradukis ROMANO VOGEL.



PUURULO

El « Altajaj Mirrakontoj » de S-ino A. MIRSKAJA.

(Vidu la komencon en nia antaŭa numero.)

IV

Mi rememoras la lunan nokton, tiun mirindan Altajan nokton aroman, freŝan. Du hundoj, liberigitaj de la ĉenligo, kondukis nin, laŭ la piedsignoj de la duonpatrino, tra la bordo de malkvieta monta rivero ; al mi malfacile estis rigardi la patron.

— Kio estas ĝi, Puurulo ? — ekscitigante demandis li. — Kien ni rajdas ? Ha ! vi, maljunulo, konfuzis nin : ĉiam ŝi forkuradis tiel, mi kutimiĝis je tio.

— Silentu ! — severe diris Puurulo. — Mi parolas, venis la tempo. Ĉiu malbono devas trovi kompenson : malbono pro malbono, — kara-nemeoj tiel parolas ; estas ak-nemeoj, ili venkas la animon per la bono, sed via edzino ne deziris la bonon ; silentu do, rigardu kaj aŭskultu.

— Ha, vi, sorĉisto ! — ekprovis la patro petoli. — Jen kion vi elpensis ; en frambujaron li veturigas . . .

— Haltu! kie troviĝis dum tiu ventego, kiam via edzino perdis la vojon, Barbaro?

— La Sinjoro pardonu, kio en lian kapon venas! — ekstremis la patro. — Jes, ŝi estis en kondomo, en sia uluso⁽¹¹⁾.

Puurulo ekridis per stranga ridvoĉo, simila al la krio de noktobirdo.

— Nu, do aŭskultu, — komencis li severe. — Antaŭ ses jaroj, post la ventego terura, kiu bruegis en la montoj, ĉe min en la ŝtonoj de l' Boltir-oeko alveturis bela kumandanino. Ŝia ĉevalo estis kovrita per ŝaŭmo kaj la tuta vesto estis disŝirita sur ŝi. Ŝi havis mallumajn okulojn kaj dikajn harligojn multepezajn. Ŝi jetis al mi monerojn kaj ordonis esplorrigardi ŝian manon. Mi komencis sorĉi. Ŝia mano havis tutan ligan da malbonaj aferoj; ĉi-tiu mano multfoje leviĝis kontraŭ homoj: mi vidis sur ĝi tri makulojn de nigra sango jam preskaŭ sekiĝinta, sed ilin kovris skarлата fresa sangmakulo de blanka homo, makulo de freŝa sango. Mi al ŝi diris ĉion, kaj ŝi ekridis. . . . Ŝia rido ensorĉis; ŝi havis blankajn dentojn, kaj ŝiaj okuloj similis al karboj.

— « Plue, kion vi vidas? antaŭdiru estonton, maljunulo. »

— Kaj mi diris al ŝi, kion mi vidis; mi diris, ke ŝi havas multe da mono; mi diris, ke ŝi estos edzino de blanka homo, ke oni surmetis sur ŝin la krucon, kaj mi konsilis al ŝi sin gardi kaj ne fari malbonon, ĉar mi vidis, ke la skarлата sango leviĝas kaj fumigas. Mi ne ordonis al ŝi fari malbonon, ĉar min ekposedis ak-nemeoj, ili ja ĉiam sugestas al bono; ili diris, ke la skarлата sango postulas venĝon. Dmitrio, ĉu vi komprenas? Puurulo ne ĉiam loĝis en la valo. Puurulo foriris iaforte en la intermonton de Boltir-oeko, kaj tiu malbonulino trovis lin tie kaj opiniis, ke ŝi estis vidinta alian, sed Puurulo silentadis. Kial li estus devinta paroli? Li atendis, ke ŝi pentos; sed la malbona animo ne volis penti. Ŝi ree malbonintencis, kaj krom tio ŝi rekonis Puurulon. Tiam mi ordonis al ŝi, ke ŝi ne venu plu en la ŝtonojn de Boltir-oeko; mi ordonis, ke ŝi ne edziniĝu kun blankulo; mi ordonis, ke ŝi ne malbonintencu kontraŭ fremda animo; mi parolis al ŝi pri la venĝo de senkulpa sango; sed ŝi nur ridetis kaj foriris. Nu, rememoru, de kie vi ŝin prenis.

Videble la patro ekstremis, kaj Puurulo insistis:

— Diru, Dmitrio, kies filino estis ŝi? de kie vi prenis ŝin?

— Nu, el uluso de iu aligentulo, — diris li nevolonte. — Vi mem ja parolis, ke vi konis ŝian patron. Mi gastis kun la edzino ĉe ŝiaj gepatroj ofte, kaj post kiam ili pereis, jam dudekjara ŝi edziniĝis kun mi.

— Sed kiel ili pereis? — kvazaŭ juĝisto esploradis Puurulo.

(11) Ulus'o = loĝigita regiono.

— Kiel ? Mi aŭdis, ke ili brulis drinkinte bragon ⁽¹²⁾ en jurto (tendo). Dum bajgo (vetrajdado) ĉiuj ebriiĝis tiam en la vilaĝo.

Kaj ree traflugis kaj silentiĝis la stranga rido de Puurulo ; la hundoj kondukantaj nin devojiĝis sub akra angulo el la frambujaro kaj ekiris la monton, tien, kie de malproksime bruis la rivero, ĝi estis tre malproksime, sed en la mallaŭteco de l' nokto ĝia bruo alflugis ĉi-tien. Mi sciis, ke tie, kie ĝi renkontis torenton ne sekiĝintan eĉ dum la varmegoj, estis malluma loko, kun perpendikulare superpendantaj ŝtonegoj. Eĉ dum serenaj tagoj en la fendoj de ĉi-tiuj ŝtonegoj estis mallume, sed kiam foje mi kaj kamaradoj malsupreniĝis ĝis unu el ili, de tie malvarmo tiriĝis, kvazaŭ el tombo, kaj ni ne ripetis plu nian provon.

— Kien ni rajdas, Puurulo ? — demandis Olnjo. — Patro ! — ŝia voĉo ektremis kordolore, — se en tiu ventego iu renkontis la panjon kaj kondukis, dirante, ke li iras hejmen per mallonga vojo : ĉu panjo povis kredi ? Patro kaj Puurulo ! la hundoj kondukas ĝis la loko, kien tiu forrajdis. Ĉu mian patrinon de sur la ŝtonegoj puŝis ŝia mano tien en la akvon ? Ho, patro, kredeble la korpo ne falis en la akvon, ĝi falis en fendon, kie ĝi kuŝas ; sed tiu ekrajdis tien por kaŝi la ostojn : ŝi ektimis Puurulon, ŝi timis pli frue trarampi tien, ŝin timigis la vojo ; sed nun ŝi timas Puurulon pli, ol ĉi-tiun vojon. Jes, Puurulo, ĉu vi tiel opinias ? ĉu tiel ?

Ŝi pala, kiel blankaj nuboj treniĝantaj tra la ĉielo, ekkaptis la veston de Puurulo, sed la lasta rigardanta antaŭ si kaj ŝajne ne vidanta ŝin diris seke kaj senpaŭze :

— Senkulpa sango fumiĝas kaj leviĝas . . . ne malhelpu min rigardi . . . pli mallaŭte !

Kaj ĉiuj eksilentigis, nur la hufoj de la ĉevaloj sonis tra la ŝtonoj de la montaj vojetoj kaj la bruo de l' rivero elportigis de pli proksime. Sur unu loko el la vojeturniĝo du kapreoloj delikataj kaj graciaj kuris antaŭ ni trans la vojon, kaj tie ĉi, kiel saluto el nebulego, aŭdiĝis la bleketo, kiun amike respondis niaj ĉevaloj.

— Barbaro ! — laŭte kaj krude kriis la patro, direktinte la ĉevalon en la kavajon, kien la hundoj devojiĝis ; sed nur ĉo respondis lian alvokon.

La ĉevalo de la duonpatrino staris alligita al arbo, kaj ni, desaltinte de sur niaj ĉevaloj, alligis ilin al tiu sama arbo.

Puurulo kvazaŭe forjetis el la ŝultroj kvardek jarojn ; per junecaj, rapidaj paŝoj li ekiris tra la vojeto turniĝanta dekstren kaj alkondukanta ĝis la superpendantaj ŝtonegoj kun profundaj fendoj super la enfluo de l' torento kaj super la rivero. La hundoj kuris ĝis la rando kaj ne kuragiĝis malsupreniĝi ; nur Puurulo, maljuna

(12) Brago = malforta alkohola trinkujo.

kaj kaduka, fariĝinta por tiu ĉi nokto juna kaj forta, kaptante je la ŝtonoj, ekŝoviĝis tien, post li ankaŭ la patro volis malsupreniĝi, sed Olnjo enkroĉiĝis kaj detenis lin, altirante lin kun senparola petego per la manoj al si, tremante, kiel herbeto, en sia tuta korpo.

— Puurulo, ne iru! — ekkriis la patro. — Puurulo, mi petas vin pri tio ĉi.

Sed deteni la maljunulon estis jam neeble. Kun la formortado de l' koro mi, mallevinte la kapon trans la kornicon, rigardis malsupren sur la elstarajojn kaj fendojn de la superpendanta super la rivero ŝtonego, tra kiu rampis Puurulo. La krio de la patro per mil eĥoj resonis en la ŝtonoj, kaj tiu sama eĥo alportis alian krion plenan je teruro kaj triumfantan ridon de Puurulo. Kaj en la strio de la luna lumo ni ekvidis malsupre sur la ŝtonoj la duonpatrinon, kun freneza teruro al ni supren turnita vizaĝo. Puurulon do kvazaŭ portis nesciata forto; kiel fantomo, li rapide glitis inter fendoj kaj kavajoj, kaj alproksimiĝis al la duonpatrino ekvidinta lin kaj ekturninta la kapon al li.

— Nu, — kriis li al ŝi, — serĉu ŝin! Tie estas ŝi, en la ŝtonoj . . . ĉu vi volus ĵeti nekulpajn ostojn kaj kaŝi la malbonon? Ne, Puurulo ne permesos tion ĉi; mi diris al vi, ke fumigas senkulpa sango, mi tion diris . . . Rigardu, rigardu! jen ŝi, la blanka virino; mi vidas ŝin! . . .

Olnjo eksaltis je la piedoj, kaj pro supermezura teruro romp-etadis la manojn. Sovaĝa krio allugis ĝis ni el malsupre. Por minuto deturniĝinte al la fratino, mi rejetis rigardon sur la ŝtonegojn kaj ekvidis, ke la duonpatrino erarpaŝis kaj ekkaptis Puurulon ankaŭ ekkriantan per mallauĉa kaj kunpremita voĉo, en kiu tamen sonis triumfo. Momento — kaj ili malaperis en la akvoturno de la rivero brue batiganta al la ŝtonoj.

Olnjo ploregis malespere kaj konvulsiis sur la brakoj de la patro, kaj pale rigardis sur la malsupraĵon. Kaj longe, ĝis la tagiĝo, ĝis la serena matenruĝo, sidis ni tie ĉi kun tremiga sento de teruro kaj malĝojo; sed dum la matenruĝo la patro sendis por la homoj kaj la ŝnuroj, kaj ni komprenis, pro kio li faris ĉi-tiun ordonon, nur poste, kiam antaŭ la tagmezo alveturis homoj.

Tra la ŝtonoj varmegigitaj per la suno, la patro supreniĝis ĝis la plataĵo super la fendo, de sur kiu falis nokte en la akvon Puurulo kaj tiu, kiun la patro nomis edzino; li mem supreniĝis per la ŝnuro el la ŝtonego kaj elrampis de tie disbatita, fleksita, per unu fojo aliformiĝinta je kvazaŭmaljunulo el homo plena je fortoj kun turmentita vizaĝo kaj kun okuloj brulintaj je sufero; li alportis putriĝintajn ĉifonojn de la vesto kaj la ostojn de nia kara patrino.

Superversiĝante de larmoj ni enterigis la karajn restaĵojn sur la ŝtonego, kie la senkulturejo sterniĝas, kiel amiko, ĉirkaŭvolvante

la teron kaj la ŝtonojn. Poste ni malsupreniĝis ĝis la ĉevaloj kaj per aliaj vojetoj alrajdis ĝis tiu loko, kie la rivero formis kurbigon, kaj en kvieta sablaĵo trovis la kadavron de Puurulo. Lia korpo estis disbatita kaj disŝirita, sed la kapo restis sendifekta, kuŝanta sur la borda ŝlimo. La vizaĝo de Puurulo refariĝis paca kaj bona

— Patro, — diris mi kun larmoj, — rigardu, kiel bona li estas ! Kara-nemeoj forlasis lin, kaj li nepre songas ak-nemeojn, anĝelojn. Ĝi ja estas vera, patro, ĉar li estis bona kaj ne amis la malbonon.

V

Kaj mi, kaj Olnjo, neniam forgesas la tombon de Puurulo kaj tiun de la patrino.

Tamen la korpon de la duonpatrino oni ne retrovis. Al ni, superŝtiĉaj infanoj, tiam ŝajnis, ke ŝin fortrenis la kara-nemeoj. tial ke ŝia malbona animo apartenis al ili de longe. Longatempe ni ne povis ŝin forgesi, kaj dum paeaj vesperoj, plenaj je luna lumo, ni per nia fantazio vidis ŝian altan fantomon kaj la vizaĝon plenan je teruro, tian, kian ŝi havis ekvidinte la leviĝantan Olnjon.

Eĉ nun mi ektemas super la ŝtonego apud la tombo de patrino, kaj mi preferas esti ĉe la tombo de Puurulo en la paca valo, kie la rivero bruadas kaj enpensiga frangolujo superŝutas per blankaj florfolioj la malgrandan tuberon el ŝtonoj kovritaj de herbo, sub kiu la bona Puurulo trovis por si la eternan pacon.

Kun la permeso de l'aŭtorino tradukis

V. KANDALOV.

MIA EPITAFO

Se iam mi povus elkuri el tombo
Kaj ekpendi super la tero
Kiel l'aera kolombo ;
Ekvidi vivon de homoj,
Ŝanĝitan koron,
De feliĉo la domoj,
En la cerbo la pensan oron ;
Se mi ne trovus pli multe mizeron :
Mi revenus trankvila en teron.

M. Kaus.



FELIETONO

El la pensoj de Tolstoj.

☆ Vera vivo estas ne tie, kie procedas grandaj eksteraj ŝanĝoj, kie oni transmoviĝas, kunpuŝiĝas, interbatiĝas, mortigas unu la alian, — sed ĝi estas nur tie, kie procedas iom-iomaj, nerimarkeblaj ŝanĝoj.

☆ Mi iris baniĝi. Mirinda estas la aŭtuna mateno, silenta, varma, verdaĵa,odoro de la foliaro. Kaj la homoj, anstataŭ ĝui tiun ĉi mirindan naturon kun la kampoj, arbaroj, akvo, birdoj, bestoj, aranĝas por si en la urboj alian naturon artefaritan kun la fabriakaj tubegoj, palacoj, lokomobiloj, fonografoj.

☆ Tero, same kiel aero kaj suno, estas aparteno de ĉiuj, kaj ĝi ne devas esti objekto de propreco. Por tio do, ke la tero estu aparteno de ĉiuj, estas necese, ke la homoj konfesu la pekon de la tera propreco.

☆ Ĉiuj estaĵoj estas nedisigeble ligitaj inter si. Ne opinii, ke povas esti bono de aparta estaĵo, aŭ ke malbono de aparta estaĵo ne estus malbono de la tuta mondo kaj ne lasus postsignon en vi.

☆ Vivante kun homoj, ne forgesu tion, kion vi eksciis en la soleco. Kaj en la soleco pripensu tion, kion vi eksciis dum viaj interrilatoj kun homoj.

☆ Boneco ne sole estas virto kaj ĝojo, sed ankaŭ — ilo por kontraŭbatali malbonon. Amo montras al la homo la celon de lia vivo; racio montras la rimedon de l'plenumo.

☆ Kiam vi sentas nekontentecon pri ĉio ĉirkaŭanta kaj pri via situacio, eniru, kiel heliko sian konkordon, en konscion de humileco al la Dia volo, kaj atendu la tempon, kiam Li vokos vin ree fari Lian faron en la vivo.

☆ Mi sendube scias, ke se mi vidis homon trapasantan tra mal-kovrita por mi vidkampo — ĉu rapide, ĉu malrapide, estas tute egale, — mi sendube scias, ke tiu homo estis sama antaŭ tiu tempo, kiam mi lin ekvidis, kaj li daŭrigos esti la sama, malaperinta de miaj okuloj. Same, mi tute ne rajtas pensi, ke tiu animo de homo, kiu aperis en lia vivo en la korpo, ne ekzistis antaŭe kaj ne ekzistos post ĝia elmontriĝo en la korpo.

☆ Por homo ne povas esti atingebla la celo de lia vivo. Homo povas nur scii ĝian direkton. Por iri, oni devas scii, kien oni iras. La ŝamo estas necesa por tio, ke oni racie kaj bone vivu.

☆ Ni ĉiuj en la vivo estas, kiel nelernintaj ĉevaloj, bridigitaj, enkondukitaj en koljungaĵon kaj al timonstangojn. Vi komencas batiĝi, vi volas vivi por vi laŭ via propra volo, vi rompas la koljungaĵon, ŝiras la ledŝnurojn, sed vi ne foriĝos, vi laciĝos, kaj nur tiam vi trankviliĝos, kiam vi forgesos pri via volo kaj submetiĝos al la supera volo — volo de Dio — kaj vi veturigos.

☆ Homo povas uzi tiun legendon, kiu transpasis al li de saĝaj

kaj sanktaj homoj de la pasinteco; sed li mem devas kontroli per sia racio tion, kio transdoniĝas al li, kaj forjeti unu, kaj elekti alian.

☆ Leĝo de Dio en ĉiuj tempoj kaj por ĉiuj homoj estas la sama, nur interpretoj kaj ritoj en diversaj religioj estas malsamaj. Kaj tial oni devas sin teni al tio, kio estas sama en ĉiuj religioj.

Esperantigis ANATOL KOŬ.

En apoteko.

En apotekon venas taglaboristo.

— Bonan tagon, sinjoro apotekisto, — li diras. — Kio helpas kontraŭ kapdoloroj?

— Bonan tagon. Ĉu vi ne estas Josefo? ĉu vi ne servas en la sinjora bieno?

— Jes; sed donu ion kontraŭ kapdoloroj.

— La kapdoloroj estas terura turmento. Ĉu ili estas fortaj.

— Jes, ili turmentas fortege, ili estas apenaŭ tolereblaj.

— Nu, alproksimiĝu, mia karulo. Sidigu sur tiun ĉi seĝon. Bone. Nun fermu viajn okulojn kaj flaru kiel eble plej forte en tiun ĉi botelon. Paŭc! ... Josefo falas dorse teren. Iom post iom li rekonsciĝas.

— Nu, kion faras viaj kapdoloroj?

— La miaj? Mi ja ne havas kapdolorojn. Nia fraŭlino havas kapdolorojn.

Tradukis O. M.

Ni boju!

La gazeto « Juneco », en sia januara numero, publikigis artikolon titolitan « Antaŭ ĉio, ni propagandu! — novjaraj deziroj », verkitan de la « direktisto » de l'nomita gazeto: S-ro Ferdinand Duviard.

El tiu artikolo ni citas la sekvantan frazon: « *Kiun rezulton atingas niaj konservemuloj, kiam, — sincere, mi konfesas, — ili bojas ĉe la pordo de l'Esperanto? ...* »

Kiel oni vidas, la *Fundamento*-fidelaj, spertaj, malnovaj esperantistoj, kiuj pasigis jam pli ol jardekon en la konstanta servado al Esperanto, estas nur *hundoj*... laŭ la juna sinjoro Duviard.

Ni ne kondamnu lin pro tiu ĉi maldeca esprimo; ĝi ja ne estas la unua en tiu speco⁽¹⁾. Kontraŭe, ni pravigu lin...

La bojado de gardhundoj ja signas ekziston de alproksimiĝanta danĝero.

Ni estu kaj restu ĉiam *fidelaj*, kiel la hundoj! Ni neniam forlasu la « pordon de l'Esperanto »; ni gardu tiun sanktejon fidele kontraŭ ĉiuspecaj atencoj! Ni estu nesubaĉetebaj, viglaj; kaj kiam ni vidas alproksimiĝi rabistojn, kiuj volas perforte penetri en la sanktejon por detrui ĝian altaron: tiam ni ne nur *boju*, sed ankaŭ *mordu*!

PAUL DE LENGYEL.

(1) En « La Revuo », antaŭ pli ol unu jaro, estis dirite, ke ili *blekas*.

BIBLIOGRAFIO

La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.

La aventuroj de Alicio en Mirlando, de LEWIS CARROLL, tradukita de E. L. KEARNEY, M. A. 132 p. 12 × 19. — British Esperanto Association, 133, High Holborn, London W. C. Prezo: 1,50 fr. (0,60 Sm.).

Ne nur infanoj kaj junuloj, sed ankaŭ plenaĝuloj kun plezuro legos tiun ĉi fantazian verkon pri la mirindaj aventuroj de juna knabino en « Mirlando », transportanta la animon en la mondon de la senkulpaj geetuloj. La libro estas ornamita de dek ilustraĵoj, ĝi estas tre bel-aspekta kaj zorge presita; ankaŭ ĝia stilo estas bona kaj la tradukinto estas kore gratulinda pro lia bone plenumita laboro.

Bulgaraj Rakontoj, de IVAN MINĈEV VAZOV, tradukis At. D. ATANASOV. Esperanta Biblioteko Internacia N° 13. 48 p. 10 × 15. — Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstrasse 18-19. Prezo: 0,10 Sm.

La enhavo de tiu libreto estas: En Pirin, Tra la montkurbaĵoj, Obstinulo, Perdita vespero, La bruligitaj garboj. — Ni varme rekomendas al niaj legantoj tiun malkaran verkon, kiu donas belajn leg-aĵojn, ĉerpitajn el la ĉarma bulgara literaturo.

Kaatje, kvarakta teatraĵo de PAUL SPAAK, esperantigita de D-ro W. VAN DER BIEST. 112 p. 15 × 21. — Paris, Hachette. Mendebila ĉe la tradukinto: 76, Mindërdoedersrui, Anvers. Prezo: 2,50 fr. (1 Sm.).

Oni certe kun plezuro legos tiun ĉi belan teatraĵon, ludotan dum la 7-a kongreso de Esperanto en Antverpeno.

Esperantaj Presliteroj. DEBERNY & C^{ie}, 58, rue d'Hauteville, Paris. — 20 p. 16 × 24.

Ekstrakto el la specimenaro (fremdaj presliteroj) de la konata literfandeja firmo Deberny, dediĉita al la esperantistaj presistoj; enhavas modelojn de diversspecaj presliteroj kun esp. supersignoj. La antaŭparolo de tiu ĉi lukse presita broŝureto estas verkita de D-ro Corret kaj ĉerpita el « Lingvo Internacia ». — Jen nova pruvo pri la malpraveco de niaj kontraŭuloj, kiuj pretendas, ke la supersignoj estas la plej grava ĝeno de la disvastiĝo de Esperanto.

Esperanta Stenografio laŭ la sistemo de Gabelsberger, verkis D-ro ALBERT SCHRAMM. 20 p. 12 × 19. — Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo). Prezo: 0,50 M. (0,25 Sm.).

Tre lerte esperantigita stenografio laŭ la sistemo de l' glora Gabelsberger, facile ellernebla kaj praktika. D-ro A. Schramm (adreso: Dresden 20) redaktas ankaŭ stenografian gazeton esperantan, el kiu eliris jam tri numeroj. — Gratulon al nia fervora samideano!

Unuaj Agordoj, poezioj de WIKTOR ELSKI kaj ESKA. 96 p. 10 × 15. — Eldono de Stanislaw Miszewski, str. Piotrkowska 87, Łódź (Polujo). Prezo: 0,20 Sm.

La legado de tiuj ĉi belaj, sentoplenaj poezioj estas vere agrabla tempopasigo. La aŭtoroj, kiuj estas rimarkindaj poetoj, sukcese riĉigis nian poezian literaturon per tiu ĉi varme rekomendinda poemaro.

Por koleriĝi, traduketoj de LUENSECUA. 23 p. 9 × 13. — « Ĉilia Esperantisto ». Imprenta Internacional, Mexico.

Amuzaj humorajetoj, kies legado ellogas ridetojn.



PEDAGOGIA FAKO

(Volonte ni respondas al niaj abonantoj en tiu ĉi rubriko iliajn lingvajn demandojn komune interesajn.)

Lojaleco, kalumnio, mensogo. (Responde al S-ro E. Grosjean-Maupin.) — En la martha numero de « La Revuo » vi adresas al ni (pli ĝuste, al mi) leteron, kiun vi komencas jene :

« Sinjoro,

Ĉar la vorto ne troviĝas en la U. V., vi opinias kred-eble, same kiel S-ro Corret, havi la rajton ignori, kio estas lojaleco. »

Estas vere, ke la radiko « lojal » ne troviĝas en la *Universala Vortaro*, tamen ĝi apartenas al Esperanto : 1) laŭ la 15-a regulo de la *Fundamento*, ĉar ĝi estas tute internacia; 2) ĉar ĝi troviĝas en la Akademia Aldona, kiu estas leĝdona. Do, tiun vorton senĝene povas uzi ĉiuj esperantistoj, la plej senkonsciaj novvortfaristoj tiel same, kiel la plej fidelaj Fundamentistoj.

Vian leteron publikigitan en « La Revuo » vi daŭrigas : « Kritiko estas permesita, sed kalumniajn mensogojn malpermesas ne nur la honesteco, sed ankaŭ la leĝo. »

Ŝajnas, ke ne estos superflue, se mi donas al vi klarigon pri la signifo de l' vortoj « mensogi » kaj « kalumni ». Jen la klarigo laŭ la fama verko *Vortaro de Esperanto* de Kabe :

« *Mensogi*. Diri tion, pri kio oni scias, ke ĝi estas malvera, aŭ nei tion, pri kio oni scias, ke ĝi estas vera. — *Kalumni*. Komuniki mensogajn sciigojn, malutilajn por ies honoro aŭ reputacio. »

Ĉiu leganto tre facile povas konstati, ke nia kritiko pri via *Vortaro* (tiel same, kiel tiu de 6—7 aliaj gazetoj) estas bazita sur nediskuteblajn kaj de ĉiu ajn facile konstateblajn *verajn faktojn*, eĉ dokumentitajn; ĝi do ne estas « mensogo », sed plej pura veraĵo. Aliparte, tiun kritikon ni faris *je la intereso de Esperanto*; ĝi do absolute ne povus esti kalumnio. — « Kalumnia mensogo » estas io alia; ekzemple : la firmo eldoninta vian vortaron dissendis cirkuleran leteron, en kiu estas dirite, ke « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto » metis en siajn artikolojn pri via *Vortaro* *tekston intence kunmetitan el vortoj signitaj en tiu ĉi vortaro, kiel malbonaj, evitindaj aŭ maloftaj*. Tiu ĉi parto de la cirkulera letero enhavas en si la kriterion de *mensogo*, ĉar ĝi estas aserto malvera (oni facile povas konvinkiĝi pri tio, komparante la plenditan tekston kursive presitan sur la 13-a paĝo de « Juna Esperantisto » kun la koncernaj vortklarigoj de via vortaro), kaj tion *scias* la asertinto; sed ĝi enhavas en si ankaŭ la kriterion de *kalumnio*, ĉar per ĝi estas celata ne nur la bonfamigo de via *Vortaro*, sed ankaŭ la diskreditigo kaj malhonorigo de la redakciaj personoj de « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto ». Ni jam publike protestis kontraŭ tiu cirkulera letero; tamen ni ne diris, ke ĝia ĵus citita parto estas « kalumnia mensogo », sed, ke « tio ĉi estas nur simpla malveraĵo ». La vorto « mensogo », kiun vi facilanime uzas, estas tiel barbara, tiel brutala, ke ĝian uzadon kontraŭ difinita persono malpermesas ne nur la honesteco kaj la leĝo, sed ankaŭ la *esperantismo*.

« *Al* » kaj « *ĉe -n* ». (Responde al S-ro M. B.). — « *Al* » estas prepozicio de *dativo*, kaj en si mem ĝi ne esprimas direktan almovon. Tamen ĝi estas uzebla por esprimi direktan almovon, ĉar tia uzo ne povas kaŭzi konfuzon. Oni povas do diri, — oni eĉ kutimas diri — : « iru *al* la spicvendisto », kvankam pli ĝuste estus : « iru *ĉe* la spicvendiston », t. e. iru por esti *ĉe* la spicvendisto (en lia butik) (vidu : « La akuzativo de direkto », en nia januara numero, paĝo 14-a). La prepozicio « *ĉe* », esprimanta lokon, uzata antaŭ persono, signifas : « en la kutima hejmo (aŭ loĝejo, oficejo, negoĉejo, restejo) de... » ; do, se oni severe esploras la nuancan diferencan inter « *al* » kaj « *ĉe -n* »,

oni trovas, ke ekz. « iru *al* la spicvendisto » signifas : « iru por komuniki kun la spicvendisto mem (pri iu persona afero), kie ajn li troviĝas », — dum « iru *ĉe* la spicvendiston » signifas : « iru en la kutiman negoĉejon de la spicvendisto (por aĉeti ion), kvankam povas esti, ke vi ne trovos lin tie ».

Per « iru *al* la kuracisto » mi esprimas, ke mi bezonas la kuraciston mem; per « iru *ĉe* la kuraciston » mi esprimas, ke la venigota kuracisto certe (aŭ verŝajne, aŭ eble) troviĝas en sia hejmo. Estas supozate, ke la sendito scias, ke mi intencas venigi la kuraciston mem, ne iun alian personon. — Kiel oni vidas, tiu ĉi lasta esprimo ne nur gramatike estas pli ĝusta, sed ankaŭ enhavas pli larĝan sencdifinon.

Jen alia ekzemplo, klariganta la uzadon de kelkaj prepozicioj kun akuzativo : En mia hejmo estas vesperkunveno; mi havas gastojn, inter ili S-ron X. En tiu ĉi momento S-ro X. kartludas en la malgranda ĉambro. La vespermango estas preta; mi do iras *al* S-ro X. (por komuniki kun li mem) kaj invitas lin *en* la mangoĉambro (por esti en la mangoĉambro). Tie, mi intencas sidi apud li, mi do sidigas *apud* S-ron X. (por esti apud li). Li diras, ke li ne vidas klare, mi do metas brulantan kandelon *antaŭ* S-ron X (por ke ĝi estu antaŭ li). Post kelka tempo li intencas rehejmiĝi; la vetero fariĝis pli malvarma, li deziras havi sian vintran surtuton, kiun li lasis hejme. Mi do sendas mian servantinon *ĉe* S-ron X. (por esti ĉe S-ro X.) por alporti tien ĉi lian surtuton. La servantino alportas ĝin kaj transdonas *al* S-ro X.

Ĉiu loka prepozicio povas esprimi direktan almovon, sekve povas esti uzata kun akuzativo; kial do la prepozicio « *ĉe* » estus escepto?

La uzado de « *ĉe* » kun akuzativo ne estas do galicismo, kiel vi diras en via letero, sed pura esperantismo; kaj se tamen ĝi oftege estas senkonfuzo anstataŭata per « *al* », tion oni povas danki nur al la fleksebleco de l'Esperanto.

PAUL DE LENGYEL.

HUMORAĴOJ

Ekstrema de ĝentileco. — Dekdujara Peĉjo estas vergota. Antaŭ ol ricevi la punon, li ekparolas al la patro :

— Paĉjo, permesu, ke mi turnu al vi mian dorson.

Alloga. — « Kiun ĵurnalon vi kutimas legadi ĉiutage ? » — « La *Ĉiuecan Sonorilon*. » — « Kial ne la *Mildan Trumpeton* ? » — « Ĉar en la *Ĉiueca Sonorilo*, ĉe priskribo de akcidentoj, ĉiam estas pli multaj viktimoj. »

Arto. — En ekspozicio de pentraĵoj : « Mi satas la seriozan arton, la vastajn scenojn, larĝe ellaboritajn. La malgrandaj pentraĵetoj absolute ne plaĉas al mi. » — « Ha ! ĉu vi estas artkriticisto ? » — « Ne, sinjoro, mi estas kadrisko. »

Trinkeja babilado. — « Italujo estas la klasika lando de l'poetoj. » — « Vere. Lando, kies kvar-spescentaj moneroj eĉ estas *liroj*. »

Materialismo. — *Fianĉino* : Mia patro riĉiĝis, kiam li estis tre juna. Ĉu mi rakontu al vi, kiel ? — *Fianĉo* : Ho, sufiĉos al mi : kiam.

Geedza interkonsento. — *Edziĉino* : Vi do ne ŝatas mian novan veston ! Tio neniel surprizas min ; mi havas gustosenton kaj vi ne havas ĝin. — *Edzo* : Nia edziĝo tute pravigas vian diron.

Inter ĉasistoj. — *Pifpaf* : Aŭdu, kolego Pafpif, tiu nova kamarado Pufpuf neniel plaĉas al mi. Li havas strangan karakteron. — *Pafpif* : El kio vi konkludas tion ĉi ? — *Pifpaf* : Ho, li estas ruza fripono. Antaŭ kelkaj tagoj mi rakontis al li unu el miaj ĉasaventuroj ; kaj li, la hipokritulo, ŝajnis, kvazaŭ li kredus ĝin.

Bona mastro. — Juna metia laboristo sin prezentas al botfaristo, por sin dungigi de li. La mastro akceptas lin.

— Junulo, — li diras, — se vi estos brava, diligenta, laborama, vi povos resti tre longatempе ĉe mi, vi eĉ povos pasigi ĉe mi vian tutan vivon. Jes, jes; jam unu el miaj dungitoj mortis ĉe mi.

Ne ekzistas kaŭzo por plori. — Ĉe pordego sidas maljuna soldato kaj fumas pipon. Apud li turniĝas knabo, rabotanta per tranĉilo bastoneton. Post unu minuto la bubo ekploras.

— Kio estas? — demandas la soldato, lasante sian pipon.

— Fi—i—ngron mi tranĉvundis....

— Nu, ne ekzistas kaŭzo por plori, — riproĉe rimarkigas la maljunulo. — He, knabo, estas evidente, ke vi neniam estos heroo. Imitu soldatojn. Mi partoprenis militon, ni batalis kontraŭ Turkoj. Foje, fraĉjo mia, sidas ni kun kamarado apud tendo, subite flugas bombo — bac! rekte sur la kapon de l' kamarado. Kaj kion do vi pensas: li eĉ ne ekplendis! Kaj jen, vi pro la fingro ploras!

Mirindaĵo. — « Aŭdu, amiko, kio okazis en nia vilaĝo: katino naskis kuniklidon. » — « Ne estas tre mirinde; sed aŭdu, kio en nia vilaĝo okazis: nia forĝisto havas filon, kiu estas tajloro. »

Eminenta hundo. — *Amiko*: Kial do vi enfermas vian gardhundon en la ĉambiron dum la nokto? kial vi ne lasas ĝin libera en la korto? — *Reamiko*: Nu, por ke oni ne forŝtelu ĝin.

La libera volo. — Du laboristoj interparolas. « La prezidanto de nia laborista sindikato, — diras la unua, — ordonis ĝeneralan strikon. Ni do striku. » — « Ha, diablo! — respondas la dua, — denove striki? mi jam abomenas tiun ĉiaman, senĉesan strikadon. » — « Ankaŭ mi ĝi tedas; sed kion fari? ni ja devas obei al li, por montri al la partonroj, ke ni laboristoj havas liberan volon. »

NIAJ KONKURSOJ

Kutime ni donas ĉe ĉiu konkurso du premiojn al la partoprenantoj de niaj konkursoj, t. e. 1) el libroj eldonitaj de Presa Esperantista Societo, en valoro de 2 ₯, — 2) samon en valoro de 1 ₯, — laŭ elekto de la premiotoj.

Ni rememorigas niajn legantojn pri la partopreno al la juĝado de nia lasta konkurso (legu en la januara numero, paĝoj 15-16).

Ni rimarkigas ankaŭ, ke la templimo de nia februara konkurso estas la 1-a de Majo 1911.

Korespondado de la Redakcio.

Ni petas tiujn personojn, kiuj deziras ricevi de ni leteran respondon, ke ili bonvolu sendi al ni internacian respondan poŝtkarton aŭ internacian poŝtan respondkuponon.

Al S-ro M. B. — La aliaj estas pres- kaj skriberaroj, preterviditaj de ni. Cetere, ili ne estas gravaj, kaj neniu — krom vi — atentigis nin pri ili.

Hadik. — Tutsimila rakonto jam aperis en nia gazeto.